A-PDF Merger DEMO : Purchase from www.A-PDF.com to remove the watermark

# STARTO

N-ro 4/2012 (245)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Partoprenantoj de la Trilanda Konferenco en Břeclav vizitis ankaŭ kastelon Lednice

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, aperas 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto**: cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz

**Identec-numero (IČ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova8@seznam. cz

**Libroservo:** p/a Anna a Jiří Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Muzeo:** muzeagrupo@esperanto.cz

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova @centrum.cz

**BANKO-KONTO de ĈEA:**

2800 186 228/2010
**Fio banka Svitavy**

**Komitato de ĈEA:**

**Prezidanto: Vladimír Dvořák,** Gregorova 2563, 397 01 Písek, vl.dv@centrum.cz, 774 999 091 (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

**Vicprezidantino:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz (Muzeo de Svitavy, rilatoj al urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

**Kasisto:** Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 332 339, vhirsx@ email.cz (membrodatumbazo, kontado)

**Komitatanino:** Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavla.esperanto@gmail.com (membroj, kluboj, sekcioj, konferencoj, informado, retaj projektoj, ekspozicioj)

**Komitatano kaj redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 530 319 263, malovec @volny.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

**Komitatano:** Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, miropiro2312@gmail.com (junularo, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio kaj UK-peranto:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

**Revizia komisiono de ĈEA:**

*Prezidanto*: Jan Řepa (Fidel), Na Valše 250, 38411 Netolice, fidel@razdva.cz

Věra Gavandová, Komenského 657, 789 61 Bludov, vgavandova@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 09 Pardubice, ludmila.srbova@seznam.cz

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorfer domo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy, direktorino: Blanka Čuhelová, tel. 461 532 704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

**Kontrollegis:** Sabine Hauge, la komitato.

# Trilanda konferenco

Inter la tagoj 27.-30.9.2012 kunvenis en la ĉeĥa urbo Břeclav (suda Moravio) esperantistoj aŭstraj, ĉeĥaj kaj slovakaj por komune konferenci. Kiel gastoj venis ankaŭ partoprenantoj el Germanio, Hungario, Pollando kaj du eĉ el Brazilo, sume 98 personoj. Ĉar la 28-a de septembro estas en Ĉeĥio ŝtata festotago (murdo de sankta Venceslao), do feria tago, la konferenco povis komenciĝi jam ĵaŭde la 27-an de septembro.



*Urbestro O. Ryšavý kun la prezidantoj de la tri E-asocioj*

Aŭspicion akceptis la urbestro d-ro Oldřich Ryšavý, dank' al kiu povis realiĝi esperantlingva versio de la oficiala urba retejo. La loka ĵurnalo informis pri la konferenco. Tie aperis ankaŭ invito al prelego por la publiko „Esperanto kiel vojo por ekkoni la mondon kaj novajn amikojn“, sed bedaŭrinde oni indikis sole la horon, sed ne tagon de la prelego. Neniu venis el la civitanoj, nur la konferencanoj mem ĉeestis. Malgraŭ tio la rakontado de Petr Chrdle pri liaj vizitoj en Japanio vekis grandan intereson, same kiel ĉi-jaraj travivaĵoj de Stano Marček en Vjetnamio.

Dum la vespera programo Peter Baláž skizis la laboron kaj planojn de la teamo E@I kaj raportis pri la ĉi-jara Somera Esperanto-Semajno en Nitra (SES), kiun partoprenis ducent personoj. Sekvis ekzemploj de mallongaj filmetoj kun esperantlingva komento aŭ subtekstoj, nome pri la urbo Písek, ŝerca televida reklamo pri jorkŝira terhundo kiel polica poŝhundo, fabelo pri Kuĉjo kaj Maĉjo. Urboj mem ofte volonte akceptas helpon de esperantistoj disfamigi la urbon aŭ regionon per kurtaj videofilmoj inter esperantistoj. La tagon fermis komuna kantado en klubejo de la studenthejmo.

La vera konferenco komenciĝis nur vendrede je la 9-a horo. La urbestro mem venis saluti la partoprenantojn kaj per lumbildoj prezentis la urbon kaj la regionon, sed lin atendis surprizo — preparita filmeto pri lia urbo kun esperantlingvaj subtekstoj. Sekvis programo „La tri Esperanto-landoj prezentiĝas“, en kiu la reprezentantoj priskribis la situacion de Esperanto en siaj landoj. Estis projekciata ĉeĥa filmo pri Slovakio kun Esperantlingvaj subtekstoj. Posttagmeze duono de la konferencanoj forveturis buse al proksima kastelo Lednice, la plej bela moravia kastelo kun granda ĉirkaŭanta parko. Post vizito de la kastelaj ĉambroj, kie la klarigon de ĉiĉeronino esperantigis Pavla Dvořáková, la plej kuraĝaj promenis dum unu horo tra la parko al turka minareto kaj reen, ĉirkaŭ lageto, kie apudvoje kreskas interesaj maljunaj arboj de diversaj specioj.



*Břeclavánek*

La vesperan programon malfermis loka folklora infana ensemblo „Břeclavánek“ (*eta Břeclavano*) per pluraj kantoj kaj dancoj akompanataj de vilonoj kaj zimbalono, ankaŭ ludataj de neplenaĝaj muzikistoj. La aŭskultantoj fine kunkantis popolajn kantojn esperantlingve.



*Aŭskultantoj*

Poste sekvis prelega vespero. Paŭlo Kaščák el Ostrava prezentis novan radiostacion Verda Stacio, kiu klopodas daŭrigi tradicion de iam tre populara Verda Stacio en Brno (1933-1937) kaj Praha (1946-1951), kies pluraj programoj jam tiam estis elsendataj ankaŭ el Ostrava. La nova stacio organizas ankaŭ Esperanto-kurson en kastelo de urbeto Bartošovice. La tri ĉeestantaj esperantistaj eldonistoj (Peter Baláž, Petr Chrdle, Stano Marček) prezentis novaĵojn de siaj eldonejoj. Ankaŭ ĈEA montris sian kompaktan diskon de voĉlegataj rakontoj de Karel Čapek (kiel ekzemplon oni aŭdis pri Morto de Arĥimedo). Okaze de la ŝtata festo operkantisto Miroslav Smyčka kantis ĥoralon Sankta Venceslao el la 11-a jarcento kaj deklamis *Romancon pri Karolo IV-a* de Jan Neruda en traduko de Miloš Lukáš.




*Esperantistoj kunkantantaj*

Sabate matene kunvenis ĉiuj tri asocioj memstare en apartaj ĉambroj kaj pridiskutis siajn organizajn aferojn, precipe la membrobazon kaj ekonomiajn problemojn.

Posttagmeze ĉiuj vizitis urban solenaĵon sub la kastelo okaze de sanktvenceslaaj festoj (budoj kun frandaĵoj, trinkaĵoj, suveniroj kaj podio kun kantoj kaj folklora humuro). Interesiĝantoj povis viziti sinagogon, Domon de Lichtenstein aŭ preĝejon de Sankta Venceslao, tute modernan, ĉar la malnova estis detruita dum la milito kaj la nova povis esti konstruata nur ekde 1992.

Vespere kunvenis Esperanto-instruistoj sub gvido de Magdaléna Feifičová kaj la tri asociaj komitatoj. Paralele okazis ankaŭ konversacia kurso kun 12 kursanoj.




En komuna programo en granda salono Margit Turková prezentis la vivon de la ĉeĥa ĵurnalisto kaj satira poeto Karel Havlíček Borovský (1821-1856) „Havlíček en Brikseno ─ ĉapitro el la ĉeĥa-aŭstra historio ─ ĉu en nova prespektivo?“. Ŝi menciis ne nur la faman „Bapto de caro Vladimir“ en traduko de Tomáš Pumpr, sed ankaŭ „Tirolaj Elegioj“ en traduko de tie ĉeestanta Jaroslav Krolupper kaj versojn pri Havlíček de Čestmír Vidman, naŭdekjara ĉeĥa poeto kaj esperantisto, al kiu M. Turková helpas eldonadi liajn nuntempajn verkojn.



*Stano Marček, prezidanto de la Slovaka Esperanto-Asocio*

Slovaka grupo simile skizis la vivon de pastro Ján Maliarik (1869-1946), kiu en sia libro „La tut-Tera ŝtato“ kalkulis kun Esperanto. Poste ili projekciis kortuŝan, profesie aktoratan filmon pri ĉi tiu apostolo de paco.

La dimanĉa programo estis denove komuna sub titoloj **Vojoj al kunlaboro kaj perspektivoj**, **Invito al interretaj projektoj** (Vikipedio, Ipernitio, aŭdo-projektoj), **Studu interrete!** (Lernu.net, Slovake.eu). Ján Vajs prezentis prelegon „Surspure de habanoj en Ĉeĥio, Slovakio kaj Aŭstrio“. La habanoj estis antikva religia komunumo vivanta en tiu regiono, kie la tri landoj najbaras, restis post ili „habanaj ceramikaĵoj“ kaj verŝajne multaj loĝantoj estas iliaj posteuloj, eĉ ne sciante pri tio. Skizitaj estis eblaj kunlaboroj pri aranĝoj (KAEST, SES, Muzea nokto), kunlaboro de Esperanto-muzeoj, interŝanĝo de ekspozicioj, komuna prezento de literaturo en interreto aŭ kompaktdiske.

*Miroslav Malovec*



*La konferencon alparolis ankaŭ s-ro Herbert Mayer, direktoro de la viena Esperantomuzeo*

# Ĉefkunsido de ĈEA

Sabate antaŭtagmeze okazis ĉefkunsidoj de ĉiuj tri organizoj. ĈEA okupis la ĉefan salonon, en kiu kunsidis ĉirkaŭ 50 membroj.

La raporton ĉefprelegis V. Dvořák, P. Dvořáková kaj kasisto V. Hirš kaj kontribuis ankaŭ aliaj estraranoj.

**a) Plenumado de prioritatoj**

La unua parto estis dediĉita al plenumado de la prioritatoj akceptitaj dum la pasintjara kongreso, kiun prezentis V. Dvořák.

Sukcesas aktivado en la muzeo en Svitavy kaj iom-post-iomaj paŝoj al ekvilibrigado de la budĝeto (preskaŭ 200 ne plu dissendataj Startoj ŝparas proksimume po 17.000 CZK jare).

Pro laboraj kaj personaj devoj ne povis labori L. Hýblová (kaj rezignis pri la estrara funkcio ĵus antaŭ la konferenco), pro kio preskaŭ stagnis aktiva intertraktado kun membroj kaj kluboj kaj ankaŭ mankis raporto de la revizia komisiono por la jaro 2011.

Multaj kluboj (sed ekzistas ankaŭ malo) kaj individuoj tamen memstare aktivas same kiel tri sekcioj (katolika, kristana kaj nevidantoj). Tute jam memstariĝis fervojistoj, el inter kiuj tamen multaj restas kiel individuaj ĈEA-membroj. Aperas unuaj kontraktoj kun kluboj kun propra statuto kaj jura memstareco (KPE Svitavy kaj poste ankaŭ EK Prostějov).

Ekzistas klerigaj kursoj – pri Vikipedio en oktobro 2011 kaj daŭre la lingva en Skokovy organizita ĉefe de AEH. Individuan helpon lingvan eblas peti ĉe M. Malovec kaj prikomputilan ĉe M. Hruška.

Kvankam la estraro alparolis kelkajn taŭgajn individuojn, malsukcesis aktivado aranĝi grupon zorgantan pri eblaj subvencioj. Tamen ĈEA en januaro ricevis signifan anoniman donacon de 20.000 CZK, por kio oni publike dankis. Plu la kunsido decidis aranĝi portempan grupon sub gvido de P. Dvořáková, kies celo estas partopreni en konkurso de la japana fondaĵo Cigno.

Ekzemple nun funkcias ĉ. 10-membra muzea kaj ekspozicia grupo sub gvido de L. Dvořáková kaj aktivas ankaŭ grupo de ciferecigado (M. Malovec, V. Türk, J. Malá, J. Dubinová, K. Votoček). Multajn tradukojn al Esperanto por Vikipedio faris P. Dvořáková kaj J. Hron. Bedaŭrinde tute stagnas laboro de pedagogia komisiono.

Ni plu kaj plu adaptiĝas al modernaj interreto kaj retmesaĝoj, kiujn ni amase uzas kun celo ŝpari tempon kaj monon. La estrarkunsidoj estas maks. dufoje en la jaro, sed ekzistas bunta intertraktado per skajpado kaj retmesaĝoj. Kompletiĝas retadresaro de la membroj kaj krom unu jam ekzistas tia konekto al ĉiuj kluboj.

Multo okazis en la Muzeo de Svitavy: ekspozicio okaze de 125 jaroj de Esperanto, muzea nokto, OSIEK-konferenco.

**b) Membrobazo kaj mastrumado**

V. Hirš informis, ke ĈEA nun havas 575 membrojn. Du negativaj tendencoj: unue la nombro malgrandiĝas kaj due pli ol duonon (entute 333) kreas dumvivaj kaj honoraj membroj, kiuj devas pagi neniun kotizon. Tamen aperas libervolaj kotizoj, kiuj helpas al la budĝeto. En la ĉefa A-kategorio ĈEA registras nur 72 membrojn.

Plue li klarigis problemojn kun raporto de revizia komisiono por 2011 kaŭzitajn pro malfrue transdonitaj dokumentoj. Laŭ la interkonsento plua kontrolado devus okazi ĉiam en januaro por pli preventi antaŭ la imposta proklamo ol kontroli en malfrua aŭtuna tempo.

El statistiko videblas kiom oni ĉi-jare ŝparas post alvoko al F-membroj ĉe Starto, sed tamen kostoj por Starto atingas preskaŭ 90 % de la enkasigitaj membrokotizoj.

Malgraŭ tio ŝajnas, ke la jaro 2012 povus alporti bonan rezulton precipe dank'al plua ŝparado, anonima donaco kaj profitdona rezulto de la konferenco.

**c) Agadraporto**

Raporton pri agado dum la lasta jaro prezentis P. Dvořáková. Oni per silentminuto rememorigis forpasintajn membrojn, al kiuj apartenis ankaŭ honoraj UEA- kaj ĈEA-membroj.

**d) Nova kotizregularo**

Post la paŭzo estis tuj traktata nova kotizregularo, kiu vekis viglan diskuton kun posta voĉdonado.

La kunsido per granda plimulto rezultis, ke en A- kaj B-kategorioj ĉiu povos decidi ĉu plu ricevadi Starton en presita formo aŭ elekti varianton legi ĝin interrete. Pro kreskantaj kostoj, sed ankaŭ por pli granda kvalito (koloraj kovrilpaĝoj kaj moderna presado), oni pagos je 50 CZK pli po jare, dum tiuj, al kiuj sufiĉas interreta versio, ŝparos 60 CZK kompare kun la nuna stato. Tio signifas, ke por esti membro en kategorio A jam sufiĉas pagi 240 CZK kaj por B-kategorio nur 140 CZK. Ni ĉiuj kredas, ke tio haltigos la membromalkreskadon kaj eble eĉ allogos novajn adeptojn!

La lastaj 4 numeroj de Starto en interreto estos devizo, kiun al abonantoj estos rete sendita ĉiam kun anonco pri aperigo de la nova numero, ĉar ĝi servas unue al membroj. Male Retkomunikoj estos dediĉitaj precipe al estontaj aranĝoj kaj diversaj anoncoj kaj informoj kaj estos libere distribuantaj al ĉiu deziranto.

**e) Ceteraĵoj**

Sekvis raporto de UEA-ĉefdelegito P. Chrdle. Li substrekis gravan rolon de UEA kiel ĉefa Esperanto-organizo kaj informis pri membrecaj novaĵoj.

Poste oni traktis kaj rekomendis al la estraro pretigi konferencon 2013 en la centra Ĉeĥio (Kolín), dum la kongreson 2014 okazigi en Prostějov kunlabore kun la loka memstara klubo.

Prezidanto sciigis, ke por la vaka loko en la komitato plej taŭgus persono, kiu zorgus pri informado kaj ekstera bildo de ĈEA kaj pri subvenciaj programoj.

*Vladimír Dvořák*



# Raporto de UEA-ĉefdelegito P. Chrdle

UEA-ĉefdelegito P. Chrdle substrekis gravan rolon de UEA kiel la ĉefa Esperanto-organizo (ne nur pro la plej multaj membroj, sed ankaŭ pro ĝia signifo kiel reprezentanto de Esperanto-movado eksteren kaj vere tutmonda agado) kaj prezentis la trarigardon de la membrokategorioj de individua membreco. Ĉe ĉiu kategorio li klarigis, kia estas la kotizo kaj kiujn servojn kaj avantaĝojn la koncerna aliĝinto povas ĝui. Li substrekis la novaĵon, ke venontjare eĉ la membroj de la plej favorpreza kategorio MG (membro kun gvidlibro) ĝuos gravan novan avantaĝon, nome ili havos alireblon al la reta versio de la oficiala organo de UEA – Revuo Esperanto.

Li ankaŭ atentigis pri la falo de la ĉeĥaj individuaj membroj (IM). Dum en la jaro 2011 ni havis 71 IM, ĉi-jare estas nur 54, inkluzive de 1 honora membro (Josef Kavka) kaj 5 dumvivaj. Kvankam ne eblis influi, ke 6 mortis (inter ili ankaŭ du honoraj membroj de UEA, Eli Urbanová kaj Jiří Vychodil), la membrofalo estas vere averta.

Krome li prezentis statistikon de la ĉeĥaj delegitoj kaj fakdelegitoj. Sian informon li finis per instigo de la membroj aliĝi kiel IM de UEA kaj invito de jam ekzistantaj IM pligrandigi la vicon de niaj delegitoj kaj fakdelegitoj.

# Aldono por komencantoj:

Zatímco delegátem Světového esperantského svazu (UEA) může být pouze zkušený esperantista, za přímé členy se mohou přihlásit i začátečníci a tak se stát jeho součástí.

Je několik kategorií členství:

**MG** (člen s Gvidlibro, tj. tištěným průvodcem esperantského hnutí, nově s přístupem k elektronické verzi časopisu Esperanto), s poplatkem **Kč 170.-**

**MJ** (člen s Jarlibro, tj. Gvidlibro doplněné o seznam všech delegátů ve světě a další užitečné údaje, slevami při nákupu knih v knižní službě UEA, má přístup k e-verzi časopisu Esperanto a slevu na kongresovém poplatku na UK), s poplatkem **Kč 420.-**

**MA** (Abonent, kromě všech výhod kategorie MJ dostává 11x ročně časopis Esperanto v tištěné formě), s poplatkem **Kč 1050.-**

Přímí členové UEA kat. MJ a MA do 29 let dostávají navíc orgán mládežnické organizace TEJO „Kontakto“

Světový esperantský kongres (UK) se bude konat v r. 2013 v islandském Rejkjavíku 20.-27. července, v r. 2014 v argentinském Buenos Aires. Připomínám zájemcům, že rozdíl ve výši kongresového poplatku pro členy a nečleny UEA je vyšší, než členství kategorie MJ a že základní poplatek se značně zvyšuje po 1.1.2013, proto je výhodné se přihlásit do konce roku.

Bližší údaje o přímém členství v UEA i o světových kongresech esperanta dostanete na adrese chrdle@esperanto.cz nebo poštou (viz tiráž)

*Petr Chrdle,vedoucí delegát UEA pro ČR.*

# Nový příspěvkový řád platný od r. 2013

Konference v Břeclavi prodiskutovala různé návrhy pro nový příspěvkový řád a nakonec velkou většinou přijala níže popsanou variantu.

Každý člen v hlavních kategoriích si může sám zvolit, zda bude požadovat dále Starto v tištěné formě či zda zvolí variantu internetového přístupu ke Startu (jednoduché přístupové heslo bude vždy s nových číslem rozesláno mailem všem odběratelům).

Vzhledem k rostoucí ceně za Starto (barevná obálka, kvalitnější tisk, dražší poštovné) se příspěvky pro odběratele tištěné verze zvyšují v A a B-kategorii o 50 Kč ročně.

Naopak členům bez Starta se v daných kategoriích členství snižuje o 60 Kč, což znamená např. poplatek 140 Kč ročně v B-kategorii!

**Výše členského příspěvku je stanovena podle zařazení do níže uvedených kategorií. Zápisné je vždy**: 20,- Kč

**Členský příspěvek:**

**A: řádný člen, osoba ekonomicky aktivní**

**- s tištěným Startem** - minimálně **350,- Kč/ro**k

**- s přístupem k elektronickému Startu** - minimálně **240,- Kč/rok**

**B: řádný člen, osoba ekonomicky neaktivní** (studenti, důchodci, invalidní důchodci, rodič na rodičovské dovolené)

**- s tištěným Startem** - minimálně **250,- Kč/rok**

**- s přístupem k elektronickému Startu** - minimálně **140,- Kč/rok**

**C: řádný člen** (rodinní příslušníci člena v kategorii A, B nebo F, osoby nevidomé, nebo zájemci o členství bez Starta vč. elektronického), **minimálně 100,- Kč/rok**

**P: příznivci esperanta** (bez závazku učit se esperanto a nároku na Starto), **minimálně 150,- Kč/rok**

**F: doživotní, řádný člen** (členové ČES, kteří v minulosti jednorázově výrazně podpořili činnost ČES; od roku 2004 se nelze stát novým doživotním členem), **roční příspěvek je dobrovolný**

## Na závěr sobotní schůze ČES přijala konference v Břeclavi tento stručný zápis:

Konference -

1. schválila zprávu o činnosti za uplynulé období
2. vzala na vědomí informaci o stavu členské základny
3. schválila zprávu o hospodaření v r. 2012
4. vzala na vědomí, že chybí zpráva RK za r. 2011 z důvodu pozdního dodání podkladů, a doporučila RK, aby ji zpracovala společně se zprávou za r. 2012
5. vzala na vědomí abdikaci L. Hýblové na členství ve výboru
6. přijala nový příspěvkový řád
7. doporučila výboru jednat o konferenci v r. 2013 v Kolíně a kongresu v r. 2014 v Prostějově
8. žádá kluby, aby naplnily usnesení sjezdu v Šumperku, které v bodě 3 ukládá klubům a sekcím prostudovat si dokument „Právní postavení klubů/sekcí působících v esperantském hnutí“, který je umístěn na webu ČES, a do 31.12.2011 nahlásit Libuši Hýblové své právní postavení a seznam představitelů včetně kontaktů. Termín plnění tohoto usnesení se posouvá do 30.11.2012 a kontaktní osobou je Pavla Dvořáková.
9. vzala na vědomí nový organizační řád katolické sekce a podpis smlouvy o spolupráci s KPE Svitavy

# AGADRAPORTO DE ĈEA

## ekde la kongreso en Šumperk

**Publika informado pri Esperanto**

Lige kun Vikimanio aperis kvar televidriportoj. Kadre de la projekto „125“ la gazetraporto pri la datreveno de Esperanto estis distribuita al ĉ. cento da ĉeĥaj amaskomunikiloj. Favora reeĥo estis precipe el Ĉeĥa Radio, sur kies retejo aperis du artikoloj kaj estis disaŭdigitaj kvar mallongaj programoj kaj tri longaj intervjuoj. (Ligiloj troviĝas en la retejo www.esperanto.cz). Dum la jaro aperis pli ol dudeko da artikoloj, precipe en distriktaj/regionaj gazetoj, sed ekz. ankaŭ en „Parlamentní listy“ k.a. Al lokaj instancoj kaj ĵurnalistoj estis distribuata broŝuro „Objevte esperanto“.

En Esperanto-Muzeo en Svitavy estis en junio inaŭgurita nova tutjara ekspozicio *„125 jaroj de Esperanto“*. Migra projekto *„Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“* estis (grandparte kunlabore kun lokaj esperantistoj – geedzoj Bloudek, geedzoj Kazdera, R. Mauserová, J. Vojáček, O. A. Fischer, M. Hruška, M. Malovec, M. Kašparů, H. Pospíchalová) plu prezentita en Česká Třebová, Ostrov n. O., Liberec, Vratislavice n. N., Česká Lípa, Doksy, Brno kaj Žirovnice – la projekto havas pluajn kontraktojn ankaŭ por la sekva jaro. La inaŭguroj estis kompletigitaj per informkampanjoj celitaj al lokaj instancoj kaj per pluraj publikaj prelegoj.

ĈEA eldonis jubilean glumarkon „125“, kluboj en Pardubice kaj Česká Třebová pretigis kadre de la datreveno apartajn montrofenestrojn en siaj urboj, en la urba biblioteko en Olomouc okazis publika prelego de J. Machačík k.s.

V. Kočvara prilaboris artikolojn pri ĉeĥa Esperanto-movado por prestiĝa kaj aprezita ĉeĥlingva enciklopedio *„Gvidlibro tra kultura aktivado kaj vivstilo en ĉeĥaj landoj en 1948-1967“*. M. Turková informis pri Esperanto dum aranĝoj de literaturistoj (ekz. Babylonfest Brno k.a.), P. Chrdle efike informadis publikon pri utileco de Esperanto dum vojaĝado kadre de siaj prelegoj pri Ĉinio, Koreio kaj Japanio.



Ekde la pasinta kongreso en Ĉeĥio aperis kvar novaj ZEOj – Memortabulo pri d-ro Hradil en Skokovy, Esperanto-tilio kaj memorŝtono en Svitavy kaj strato *Zamenhofova* en Prago.

Fotokolekto pri ZEOj estis fondita en la E-muzeo en Svitavy.

**Internacia kunlaboro**

En la pasinta jaro la nova estraro estis okupita i.a. precipe per ordigo de juraj kaj financaj aferoj kaj aktualaj projektoj. Intensigo de internaciaj kontaktoj estis pro tio prokrastita. Krom ĝeneralaj informinterŝanĝoj kun UEA, EEU kaj landaj asocioj tamen sukcese evoluas kunlaboro kun Slovaka Esperanto-Federacio (reciproka partopreno kaj aktiva programkontribuo al aranĝoj – ekz. dum Muzea Nokto, inverse ĈEA-membroj dum KAEST kaj SES). Danke al preparado de la Trilanda konferenco estis starigita bona bazo por plua evoluigo de kontaktoj kun Aŭstria Esperanto-Federacio. Esperanto-Muzeo kunagas kun Interkultura Centro Herzberg, individuaj kontaktoj estas ligataj ankaŭ pere de paĝoj ĉe Ipernity kaj Facebook kaj pere de eksterlandaj vizitoj en kluboj.

**Kunlaboro kun neesperantaj senprofitaj organizoj**

Esperantistoj prezentiĝis dum Semajno de volontulado en Prago (novembro 2011). ĈEA ligis kontaktojn kun skolta grupo Vanaivan Kopřivnice, kiu savis tabulon el Esperanto-monumento. Aperis surloke porpublika diskuto, televida riporto kaj artikoloj pri la temo. En la kunlaboro engaĝiĝas precipe J. Tomeček. Estis ligita kunlaboro kun Bahaa komunumo en Ĉeĥio – en majo 2012 okazis prelego en Muzeo Svitavy, ĉeĥlingva artikolo pri rilatoj inter bahaismo kaj esperantismo aperis en la muzea retejo kaj estis publikigita ankaŭ en „Baháí listy". En kunagado kun *Asociace Brontosaura Svitavy* okazis pluraj privojaĝaj prelegoj, kiuj samtempe kondukis novajn interesitojn al nia muzeo. En 2012 estis komencita esplorado de ebleco pri registriĝo en diversaj retejoj por senprofitaj organizoj.

**Lingvo kaj instruado**

Stato de lingvoinstruado kompare kun aliaj agadoj ne estas tro ĝojiga, tamen kadre de eblecoj menciindaj aktivecoj okazis. Regula lingvoklerigado kadre de kluboj laŭinforme okazas precipe en Mladá Boleslav, Olomouc, Ostrava, Hranice n. M. kaj Moravské Budějovice.

Ĉar la tendaro en Lančov nuntempe funkcias por Esperanto bedaŭrinde nur marĝene, la ĉefa lingvokleriga aranĝo por ĈEA-membroj estas nun printempaj kaj aŭtunaj semajnaj seminarioj en Skokovy oficiale organizataj de AEH, precipe de J. Drahotová, estrino de EK en Mladá Boleslav.

Infanaj rondetoj funkcias en Okříšky (K. Bártlová), Brandýs nad Orlicí (Z. Novotná) kaj Ratíškovice (J. Melichárková). En majo 2012 okazis en Svitavy aparta „Infana tago", kie gastis ankaŭ infanoj el Pollando.

P. Chrdle gvidas kurson kadre de la grupiĝo „Gaja senioro" en Prago. En Masaryk-Universitato Brno J. Vojáček sukcesis denove malfermi ekde aŭtuno 2012 kurson de Esperanto por studentoj.

Korespondaj kursoj estas kunordigataj de J. Melichárková, la ĉefa lektoro estas M. Tomečková. La nombro de nunaj kursanoj – sume komencantoj kaj progresintoj, entute 10 – estas alarme malgranda. Tamen ĝojige estas, ke el tiuj tri post fino de la komencanta kurso aliĝis plu al la progresinta.

Ĉirkaŭ 30 ĉeĥaj studentoj estas registritaj ĉe Lernu.net – ili estis aparte kontaktitaj kun oferto de konferenco en Břeclav kaj seminario en Skokovy, sed pozitiva respondo venis nur de kelkaj. La ĉefa problemo estas, kiel akiri efikan kaj por ĈEA-budĝeto finance elteneblan reklamon por la kursoj.

Dum OSIEK-Konferenco en Svitavy (julio 2012) okazis sukcesa tutsemajna kurso por komencantoj kaj duonprogresintoj gvidita de Stano Marček, kiun utiligis plejparte partoprenantoj el Ĉeĥio. Klubo en Mladá Boleslav eldonis instruhelpilon „Legolibreto V + VII". Grandan helpon prezentas en www.slovnik.cz senpage disponebla ambaŭflanka granda vortaro de Josef Hron, kiu estas daŭre kompletigata. En la sfero de faka terminologio aperis labora versio de psikiatria vortareto kreita de M. Kašparů. M. Turková kunlaboras pri gastronomia terminologio (kune kun J. Werner).

Tute nova grupo aperis en Uherský Brod, kiun fondis Helena Tlachová. Ŝi ankaŭ instruas Esperanton al siaj grupanoj.

## Kluboj

Entute 27 kluboj en Ĉeĥio montras almenaŭ ian partan aktivecon (el ili pluraj funkcias regule kaj aktive) kaj ok pliaj funkcias longdaŭre pli malpli nur formale. Kluba vivo alfrontas ĝenerale tendencon al malkresko kaj estas igata adaptiĝi en sia formo kaj speco de aktivecoj al novaj sociaj cirkonstancoj. Laŭ jura pozicio en ĈEA ekzistas kluboj kaj sen jura memstareco, kaj kun jura memstareco (derivita de la statuto de ĈEA, sed kelkaj – ekz. Svitavy, Prostějov – eĉ kun propra statuto). ĈEA-estraro dumjare klopodis ordigi ne ĉiam klaran situacion tiuflanke.

Ĝojiga informo estis fondo de nova klubo kadre de ĈEA en Moravské Budějovice, gvidata de Viktor Dvořák. Ekde novembro 2011 okazis pluraj tradiciaj aranĝoj organizataj de la lokaj kluboj: precipe Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek, Silvestra balo en Česká Třebová, Regiona renkontiĝo en Svitavy, Printempa Renkontiĝo de EK Šumperk en Postřelmov, Junia Renkontiĝo de EK Přerov en Lipník n. B., Grimpado al Ĉantoria, Jubilea renkontiĝo de ekstendaranoj en Lančov kaj Postferia Renkontiĝo en Písek.

ĈEA-estraro lanĉis novan projekton *„Delegitoj“* (analogio de la Delegita reto de UEA), kiu celas kompletigi reton de kluboj je komunumoj, kie kluboj ne funkcias. Urboj kun ne plu funkciantaj kluboj estis ŝanĝitaj je urboj kun delegito: M. Bloudek (Karlovy Vary), V. Hirš (Vyškov). Dume estas kvin novaj delegitoj: P. Chrdle (por distriktoj Praha-západ kaj Beroun), J. Křížková (Lanškroun), V. Türk (Netolice), M. Kazdera (Liberec) kaj P. Jačka (Kroměříž).

La novaj lokoj aperas dume en la mapo de kluboj en www.esperanto.cz. Estas prilaboritaj ĉefaj reguloj kaj kondiĉoj por kunlaboro, sed ili estas ankoraŭ precizigendaj.

## Sekcioj, komisionoj kaj laborgrupoj de ĈEA

Inter la sekcioj plej aktivas katolika sekcio, gvidata de M. Šváček, havanta 40 membrojn (+ al kiuj grupiĝas pli ol 60 membroj de la ĉeĥa IKUE-sekcio-nemembroj de ĈEA). La sekcio daŭre eldonas ankaŭ rete disponeblan gazeton „Dio benu“, en julio organizis sian renkontiĝon en Žirovnice kaj partoprenon de siaj membroj en IKUE-kongreso.

KELI-sekcio gvidata de P. Polnický plu printas kaj distribuas por KELI ĝian gazeton „Dia regno“. Sekcio de nevidantoj gvidata de J. Příborský daŭre eldonas sian songazeton „Aŭroro“.

M. Malovec aktualigis informretejon de la Pedagogia Komisiono. Inter novaj laborgrupoj plej aktivas la muzea kaj ekspozicia kaj la cifereca. Grupo pri tradukado de turismaj tekstoj pro aliaj aktualaj taskoj de ĝiaj membroj iom stagnis. Laborgrupon pri komputilumado ĝenerale oni ankoraŭ ne sukcesis starigi kaj funkciigi.

## Komunikiloj de ĈEA

La ĉefaj komunikiloj estas la gazeto „Starto“, retejoj (www.esperanto.cz, www.muzeum.esperanto.cz, muzea paĝo ĉe Ipernity) kaj Retkomunikoj.




*Pavla Dvořáková*
*(daŭrigota)*

# Skokova seminario

**okazis jam 36-an fojon**

de la 8-a ĝis 14-a de oktobro 2012

Sunajn posttagmezojn en naturo povis ĝui samideanoj, agrablajn ekzercadojn de la lingvo kaj babiladon antaŭtagmeze kaj vespere. Venis entute 19 personoj, sed ne ĉiuj restis tutan semajnon, ĉar vere dum septembro estis multe da esperantaj aranĝoj.

Grava estis kunveno kaj laboro de skipo pri kuirarta vortaro – Margit Turková, Marie Ribasová kaj Jan Werner. Aliaj ekzercadis gramatikon, paroladon, rakontadon, babiladon dum bona humoro antaŭtagmeze, ofte ĉe komputila ekrano de Míša Filip kun alterna gvidado de Líba Filipová kaj J. Drahotová. Ĉiu vespere okazis prelegoj, diskutoj kaj eĉ disputoj. Antaŭ vespero ni (ne ĉiuj) fabrikis nekredeblajn belaĵojn kaj preskaŭbelaĵojn. Kaj antaŭ matenmanĝo ni gimnastikis laŭ jogmaniero de Blanka Hužerová.

**Lunde** prelegis Jan Werner pri frazeologiaj problemoj kaj sciigis pri eldonota „Frazeologia vortaro“ de Josef Cink. La diskuto daŭris eĉ marde. Parolis Viktor Dvořák kaj lia edzino.

**Marde** okazis prelego de Margit Turková pri Karel Havlíček Borovský. Poste ni povis rigardi fotojn el Trilanda Konferenco en Břeclav kaj aŭskulti komenton.

**Merkrede** prezentis prelegon kun bildoj Marie Žížalová pri kastelo Konopiště, kie ŝi estis ses jarojn ĉiĉeronino. Ni rakontis kun bildoj pri 6-a kongreso de AEH en Štíří Důl. Ankaŭ estis daŭrigite pri K. H. Borovský nur en ĉeĥa lingvo kaj pri intenco verki por vira aktoro „teatron por unu aktoro“ teatraĵon pri K. H. Borovský, Jan Neruda kaj Karel Hašler pere de kunlaboro inter Čestmír Vidman, Jaroslav Krolupper kaj Margit Turková.

**Ĵaŭde** ni aŭskultis rakontadon kun bildoj de J. Drahotová pri sepsemajna vojaĝado de Bruno Henry en Turkio kaj Irano kaj ŝian rakontadon pri Andreo Cseh – aŭtoro de Ĉe-metodo. Poste ni spektis privatan DVD pri interesa, stranga „Hnojný dům“ (Sterka Domo) en proksima Izera Montaro (Jizerské Hory).

**Vendrede** J. Drahotová prezentis sian novan projekton – infana libro de Janusz Korczak „Reĝo Maĉjo la Unua“, kiun libron ŝi komencis traduki el Esperanto al la ĉeĥa lingvo.

Ĝis preskaŭ noktomezo ni kantis, sed ĉefe aŭskultis la agrablan voĉon de František Filip kaj liajn folklorajn kantojn el Moravio kaj Slovakio.

**Sabate,** jam lacaj de aŭtuna aero kaj naturo, ni rigardis filmon „La Kreo de la Mondo“ de Jean Effel kaj poste babilis en amika rondo, promesante reveni printempe.

**Dimanĉe** matene venis Eva Pánková kun ĝoja raporto: Ŝi laŭ sia kutimo matene ĉiam aŭskultas radioaparaton kaj aŭdis gratulon, sufiĉe longan, por Čestmír Vidman. Bona mesaĝo dum nia diskurado.

Ja, ankaŭ vi povas jam nun aliĝi por printempa seminario de 15-a ĝis la 21-a de aprilo 2013.

*J. Drahotová*

Alian raporton en la ĉeĥa lingvo vi povas legi sur ttt evinatelier.cz sub tuŝilo „jak chutná…“. Ĝia aŭtorino estas Milada Zemanová.

# Nova grupo en Uherský Brod

Nia grupo naskiĝis malfacile. Mi donis en Uherský Brod gazetanoncon, ke mi konatigos homojn kun Esperanto. Tio estis en monato februaro. Poste aliĝis unu juna viro kaj lia amikino, poste mia amikino kaj mi trovis unu viron ĉirkaŭ 70-jaran de nia vilaĝo. Nun mi havas 4 personojn.



Mi tre ŝatas lerni Esperanton, ĝi estas mia kora afero. Mi estas en pensio, sed mi havas tiom multe da laboro, ke mi ne havas tempon pensi pri malsanoj.



*Kun brazila amiko Jorge Luiz Santos Menezes, kiu partoprenis ankaŭ en la trilanda konferenco en Břeclav*

Nunjare mi festis mian vivjubileon, 60 jarojn. Ĉion mi preparis en verdaj-blankaj koloroj kiel en Esperanto. Mi invitis miajn geamikojn el Francio, mi konas ilin 22 jarojn, poste alflugis mia filino Marie kun edzo Darren kaj genepoj el norda Irlando. Neniu sciis, kion mi preparis, krom parolado en slovaka kaj Esperanto, ĉar mi vivis en Slovakio. Mi invitis bonan orkestron, ni havis 50 homojn kaj amuzis nin de la dua horo posttagmeze ĝis la dekunua kaj duono.




Ĉio estis perfekte preparita, mi havis profesian kameraiston kaj fotografistinon. Sekva tago estis dimanĉo, mi havis en nia preĝejo meson al mia vivjubileo. Mi dankis dum la meso nia paroĥestro, en la ĉeĥa kaj Esperanto. La du tagoj estis belegaj, la geamikoj el Francio restis unu semajnon kaj mia familio el Irlando du semajnojn, ni povis kune ĝui niajn genepojn.

*Helena Tlachová*
*http://zmsoft.cz/esperantoub*



# Raporto pri ĈESAT 2012

La ĉi-jaran tradician (inventitan 1989 de Hoffmann kaj Smyčka) ĉeliman renkontiĝon **Ĉ**eĥa-**Sa**ksa **t**ago je la 3-a de oktobro en la urbo kaj en la ĉirkaŭaĵo de la kuracloko *Bad Schandau* (Saksa Svisujo) partoprenis 3 ĉeĥoj kaj 16 germanoj. Ni vizitis la tre interesan dulingvan ekspozicion en la „Nationalparkhaus“ (domo de la nacia parko) kaj vidis tie plej novan filmon pri la belecoj de tiu nacia parko.



Poste ni tagmanĝis tie kaj havis kunsidon kun prelego de *Karel Votoček* pri sia biciklado apud la rivero *Elbo* kaj amuzrakonto pri patro kaj filo de *Irmgard Bärenz* kaj prezentado de bildserioj unue pri la urboj laŭlonge de *Elbo* senditaj de *Josef Kříž* kaj de pliaj fotoj el Svisio kaj Francio prezentitaj de *Frank Nitzsche*.

Posttagmeze ni ekskursis al novkonstruita belvidturo en *Rathmannsdorf* de kie ni povis ĝui dum tre agrabla vetero la belegan aŭtunan pejzaĝon kun imponaj montoj ĝis la limregiono al Ĉeĥio. Fine ni kunsidis babilante ĉe kafo kaj kuko, eble ankaŭ bongusta biero en la ĉestrata vilaĝa gastejo *Heiterer Blick* (gaja elrigardo).

*Frank Nitzsche kaj Karel Votoček*

# Skalka

Tri najbaraj kluboj en Hanakio (Přerov, Prostějov, Olomouc) okazigas ĉiujare renkontiĝon en vilaĝo Čelčice kaj banurbeto Skalka, ĉar en la unua vivis nia karmemora esperantisto ing. Josef Ivo Novák kaj en la dua li estas entombigita. Ĉi-jare ni vizitis lian tombon la 17-an de septembro.



*laŭ Václav Nosek, Kojetín*
*fotis Ladislav Láni*




# Kursoj en Olomouc

Gazeto de Patrujscienca Societo Muzea en Olomouc informas, ke en muzea ĉambro de la societo okazas regulaj vendredaj kursoj de Esperanto, gvidataj de ing. Jiří Machačík, kiu tie la 4-an de oktobro 2012 prelegis pri L. L. Zamenhof kaj 125 jaroj de Esperanto-movado en la mondo.

# 110 jaroj de EK Praha

Nia solena kunveno la 8-an de novembro 2012 estis tre modesta, tute nekomparebla kun la granda solenaĵo pasintjara okaze de 110 jaroj de la klubo en Brno. Nia kunveno okazis labortage, ĉeestis ĝin dek personoj, el ili du gastoj el Benešov.

Komence mi tralegis salutleteron de Pavla Dvořáková, asocia komitatanino, poste artikolon de František Barth, kiu apartenis al la organizantoj de la fonda kunveno de nia klubo en la jaro 1902 kaj kiu fariĝis la unua kluba sekretario. Li detale priskribis la tiaman situacion en Prago, kiam ĉefaj ĉeĥaj ĵurnaloj rifuzadis publikigi informojn pri Esperanto kaj kiam dank´ al du ĉeĥaj redaktoroj: Xaver Menhard en la ĵurnalo „Pražský denník“ kaj Kriegelstein-Vojnar en la gazeto „Nájemník“ tamen la ĉeĥa publiko estis pri Esperanto informata. Tiam en la librovendejo de Eduard Weinfurter estis disvenditaj 300 ekzempleroj de lernolibro de Theodor Čejka kaj sekve oni opiniis, ke estus bone fondi klubon por la parolantoj de la internacia lingvo.

Dank´al „Pražský denník“ kaj „Nájemník“ la unua kunveno de amikoj de la lingvo Esperanto okazis la 20-an de junio 1902 en la restoracio en „Konvikt“ (Bartolomějská strato) kaj la programo de la kunveno estis lego kaj prezento de la statuto de la proponata klubo. La statuto estis farita laŭ kutimaj modeloj. Por la kunveno estis invitita kvindeko da personoj, sed venis proksimume dek personoj (unu sinjorino), do neatendite malgranda nombro. La propono de la statuto estis sendita por oficiala aprobo kaj estis decidite kunvoki la fondan-konstitucian kunvenon nur en aŭtuno Esperanto, ke oni ankoraŭ sukcesos gajni novajn interesulojn.

La statuto de la klubo estis aprobita de la imperiestra reĝa guberniestrejo la 23-an de oktobro 1902 (n-ro 209.256) kaj sekve la fonda kunveno de la klubo estis kunvokita por dimanĉo la 9-a de novembro 1902 en la ĉambregon de restoracio „U Štajgrů“ (nun en la komerca domo U Nováků en Vodičkova str.); la ĉambrego sufiĉis por 300 – 500 personoj. (La 9-a de novembro estis naskiĝtago de la librovendisto Ed. Weinfurter – li naskiĝis en 1870, do tiam li estis 32-jara.) Fine do la 9-an de novembro 1902 venis la tago de la fonda kunveno de „Esperantista Klubo en Praha“. En la granda ĉambrego estis malpleno, oni do prokrastis la komencon de la kunveno je unu horo, sed tiam kunvenis 15 ĉeestantoj, el kiuj du-tri estis novaj. Tiam oni senceremonie elektis la prezidanton de la klubo Ed. Weinfurter kaj la komitatanoj fariĝis: vicprezidanto Fr. Kühnl, sekretario Fr. Barth, kasisto J. Görner, protokolisto Ed. Kühnl, inventariisto S. K. Neumann, bibliotekisto P. Vaníček, anstataŭantino f-ino Heinthalová. Kiel kunvenejo estis elektita la kafejo „Union“ (en Ferdinandova strato, nun Národní). La fonda kunveno de nia klubo ne multe diferencis de la solena kunveno post 110 jaroj.

Post la historia rememoro de Fr. Barth s-anino Margit Turková ripetis sian prelegon pri Karel Havlíček Borovský; tiun prelegon ŝi jam prezentis en Břeclav. Sekvis diskuto, i. a. la kluba prezidanto Ing. Trojan denove rakontis iom pri la UK en Hanojo. Kiel sola ĉeĥo en tiu kongreso li salutis la UK en la nomo de ĈEA kaj ankaŭ en la nomo de nia klubo.

*Jiří Patera*

# KAEST 2012

Modra, Slovakio, 2012-11-15/18

Jam duan fojon organizis KAEST-on la teamo E@I (Edukado ĉe Interreto) en la slovaka urbo Modra. Entute 46 partoprenantoj el 11 landoj eklaboris jam ĵaŭde kaj finis dimanĉe antaŭ tagmanĝo. El Ĉeĥio partoprenis Petr Chrdle, Milada Broumová, Karel Votoček, Miroslav Malovec kaj junuloj Marek Blahuš, Miroslav Hruška, Václav Zouzalík kaj Michal Matúšov, nomata Kubof, slovako studanta en Brno. Bedaŭrinde ne venis malsaniĝinta Pavla Dvořáková.



La ĉeftemo de la nuna KAEST, nome „Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj“, venigis reprezentantojn de ILEI (instruistoj) kaj ISAE (sciencistoj) por ligi kunlaboron kun E@I. Ankaŭ plejparto de la prelegoj koncernis edukadon, precipe instruadon de lingvoj per interretaj programoj (ViVo, Kono, BEK, Moodle, Duolingo, RITE kaj Liberaj Studoj), instruadon al pensiuloj, instruadon per kantoj, instruadon per rekta metodo, pedagogian terminaron.

En la programo ne mankis trejnado por Vikipedio, prelego pri parencaj projektoj kaj pri lingvistikaj temoj (slavaj lingvoj, novslava lingvo, interjekcioj kaj onomatopeoj). Aperis kelkaj prelegoj alitemaj, ekz. pri novaj trajnoj en Ĉeĥio, pri misteraj grotoj (cenotoj) de Majaoj kaj pri ligado de speleologaj ŝnuroj.

Je dispono estis du prelegejoj, kie multaj prelegoj okazis samtempe kaj ĉiu scivolemulo devis decidi, kiun preferi. Unu ĉambro kun komputiloj servis por vikipedia trejnado kaj en kinosalono estis komunaj programoj por ĉiuj, ekz. kvizo pri Vikipedio kaj TED-filmetoj kun subtekstoj — interesaj homoj tie montris novajn manierojn de pensado.

En la kinejo realiĝis ankaŭ teleprelego skajpa kun Katalin Kovats pri retaj interlingvistikaj studoj kaj kun José Antonio Vergara pri la estonteco de ISAE kaj Scienca Revuo.



Niaj eldonistoj tie prezentis siajn librojn, ekz. *RUR* (P. Chrdle), *Matematika klarigo de la mondo* (Z. Tišljar), *Bibliografio de Esperantisto Slovaka (J. Vajs, Ľ. Fajth*), aĉeteblaj en Libroservo. Dikan libregon de Á. Mathé *Bibliografio de Esperantaj periodaĵoj* prezentis L. Szilvási, vere impona listo de ĉiuj periodaĵoj inkluzive de klubaj informiloj.

La teamo E@I kompreneble prezentis ankaŭ siajn planojn kaj projektojn. En siaj materialoj ĉiuj ricevis KD pri Vikipedio, la lastan verkon de la teamo.

*Miroslav Malovec*

# Raporto pri aktivadoj de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio en la jaroj 2011-2012

### (post la pasintjara oktobra Kongreso de ĈEA 2011 en Šumperk ĝis nun)

La Ĉeĥa IKUE-Sekcio havas 103 membrojn (42 ĈEA-membroj, aliaj nur IKUE-membroj). La nombro bedaŭrinde konstante malaltiĝis pro mortoj de la membroj kaj ĉesigoj de la membreco.

La sekcio eldonas 28-paĝan gazeton DIO BENU en eldonkvanto de 240 pecoj, kiu estas kvaronjara periodaĵo regule aperanta jam 22 jarojn, havanta abonantojn ankaŭ en eksterlando.

Por nevidantaj membroj estas sonregistrata la sekcia gazeto DIO BENU.

De la 7-a ĝis la 11-a de marto 2012 du membroj partoprenis ekumenan aranĝon – Bibliajn Tagojn en Trento, Italio.

Sabate la 26-an de majo 2012 okazis renkontiĝo de ekstendaranoj de la Libertempa E-Tendaro en Herbortice 35 jarojn post perforta ĝia likvido fare de fifama StB en la jaro 1977. La renkontiĝon partoprenis eĉ post tiel longa tempo 45 ekstendaranoj.

De la 1-a ĝis la 3-a de junio 2012 okazis belega jam la tria tradicia renkonto de la sekcianoj kaj kelkaj nemembroj de la sekcio en la urbo Žirovnice. La aranĝon partoprenis ankaŭ gastoj el Slovakio. Kadre de la renkontiĝo okazis tre bela ekskurso al la urbo Dačice kunlabore kun tiea urba biblioteko. Sekvis ankaŭ vizito de Kostelní Vydří.

La 65-an tre sukcesan Kongreson de IKUE en Pécs en Hungario okazintan en la tagoj de la 14-a ĝis la 21-a de julio 2012 ĉeestis 11-persona grupo de anoj de la Katolika Sekcio de ĈEA.

Kelkaj membroj de la Sekcio aktive engaĝiĝas en la aktivadoj de ĈEA, AEH, IFEF, TEJO kaj aliaj movadaj organizaĵoj. La sekcianoj ankaŭ aktive partoprenas organizadojn de pluaj E-aranĝoj, kelkaj ankaŭ aktivas kiel funkciuloj de aliaj sekcioj, kluboj ktp.

Prezidanto de la Katolika Sekcio de ĈEA s-ano Miloslav Šváček post okjara prezidanteco de IKUE estas elektita vicprezidanto de IKUE. Aktiva membro de la sekcio s-ano Jindřich Tomíšek estas estrarano de IFEF kaj prezidanto de Ĉeĥa Sekcio de IFEF, s-ano Marek Blahuš aktivas en la komitato de la Ĉeĥa E-Junularo (ĈEJ).

La sekcio havas siajn interretajn paĝojn regule aktualigatajn, kie oni povas interalie trovi ne nur kelkajn lastajn eldonojn de la sekcia revuo Dio Benu, sed la tutan ĝian arkivon, Praktikan Kompendion de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio inkluzive de ĉiuj kantoj kun muziknotoj kaj melodioj en formatoj midi kaj mp3. La adreso de la sekciaj interretaj paĝoj estas jena: www.ikue.org/cz.

La jena raporto enhavas nur koncizan skizon de la ĉefaj aktivadoj de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio.

Penčice, 17.9.2012 Miloslav Šváček – prezidanto de la sekcio

# La 6-a Internacia kongreso de AEH-IKEH

en Štíří Důl (Skorpia Valo) ĉe la urbo Krucemburk




okazis post kvin jaroj en la tagoj 13.-16.9.2012. La kongreso estis organizita en ĉarma loko de la regiono Vysočina, en somerrestadejo. Unue aliĝis nur 49 membroj, fine partoprenis 53 esperantistoj, inkluzive de kelkaj eksterlandanoj el Hungario, Bulgario kaj Nederlando. La kongresa temo „Helpu, kie vi povas" akompanis la partoprenantojn dum ĉiuj kvar tagoj. La psikiatro, kuracisto, verkisto kaj diakono Max Kašparů traktis la temon en sia prelego „Rilatoj kaj statoj estas sorĉa cirklo". La prelego rilatis problemojn kaj minuskompleksojn de la homoj, kiujn li spertis en sia psiĥiatria kaj animzorga konsultejo. Teoriajn principojn kaj siajn spertojn, kiuj koncernis helpadon al handikapitaj homoj, precipe al infanoj, klarigis en la prelego Pavla Dvořáková.

Margit Turková rakontis pri la plej eminenta persono de la regiono Vysočina, pri Karel Havlíček Borovský. La esperantistoj vizitis ankaŭ memorejon de fama pentristo Jan Zrzavý (en la kongresaj materialoj ni trovis belan libron pri liaj vivo kaj arto, kiun al nia kongreso dediĉis la estro de la urbo Krucemburk) kaj ankaŭ lian tombon. Sinjoro Václav Janda, instruisto kaj kronikisto de la urbo Krucemburk bonvenigis nin kaj rakontis la historion de la urbo de la 14-a jarcento ĝis la nuntempo.



Ne mankis eĉ spertoj pri la rekta metodo de Esperanto-instruado, pri kiu entuziasme rakontis Viktor Dvořák. La radioamatoroj Martin Kumpošt kaj František Frýbert prezentis al la ĉeestantoj radioelsendon sur mallongaj ondoj kaj ĉiujn surprizis la sukcesa ondokontakto kun Novzelando. Ni admiris ilian lerton labori kun alportitaj aparatoj. Viktor Dvořák aranĝis en apuda gimnastikejo Esperanto-ekspozicion „De Komenský al Zamenhof" kaj Petr Chrdle libroservon. Ankaŭ videoprezentadoj pri universalaj kongresoj kaj rakonto de Kvído Janík pri Irano estis interesaj partoj de la programo.

La vesperoj ne estis enuigaj. Tra la salono sonis kantado akompanata per du gitaroj kaj en malfruaj horoj ĉe bivakfajro en indiana tendo estis agrabla travivaĵo.

La sabata antaŭtagmezo apartenis al oficiala traktado de la 6-a kongreso. La kongreso estis inaŭgurita per la Eŭropa himno kaj bonvenigo de gastoj.

Sinjorino Jarka Pecinová, la gvidantino de la restadejo, klarigis al ni la historion de la tuta areo kaj de la ĉirkaŭaĵo.

En la nomo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio salutis la kongreson Pavla Dvořáková kaj poste estis legitaj dek salutmesaĝoj: de la prezidanto de UEA Probal Dasgupta el Hindujo, de Legio de Bona Volo el Brazilo, de la prezidanto de ILEI el Hungario, de la administranto de Esperanto-kastelo en franca Greziljono, de samideano Koffi Doumegnon el Togolando, el Germanio de gemembroj: Kurt Langer el Dresden, Delia Pick el Hamburg kaj Heinrich Dandorfer kun Herbert Busch el Weiden; el Francio de Joëlle Huet kaj de nia ĉeĥa multjara membro St. Štefan el Kladno.

Post la raporto pri agado de la asocio (de la lasta kongreso en 2007 ĝis nun), sekvis raportoj pri la financa mastrumado, la revizia komisiono kaj baloto de la malnov-nova komitato.

**Estis aprobitaj:**
Lenka Angelová, Inĝ. Josef Hron, Inĝ. Josef Krob, Jana Křížková, Miroslava Kosnarová, Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová, Pavol Petrik.

**Redakcia konsilio:** Míša Filip, Zdenka Novotná kaj Jiří Kosnar.

**Revizia komisiono:** Pavel Nechvíle kaj Inĝ. Stanislava Nováková.

**Kiel organizantino de lingvaj seminarioj en Skokovy** Jindřiška Drahotová.

Post la diskuto kaj preparo de rezolucio la kongresan traktadon ni finis per Esperanto-himno.

Endas mencii la turismajn travivaĵojn: Posttagmeza busekskurso al la pilgrimpreĝejo „Zelená hora“ kaj al la kastelo Žďár lasis en la partoprenantoj bonajn impresojn, same kiel iom bizara skulptaĵo, kiu staras kiel simbolo de la limo inter Moravio kaj Bohemio.

Granda statuo de la ĉeĥa simbolo – leono rigardas en Bohemion kaj la moravia simbolo – la aglino direktas sin al Moravio.

Por la lasta vespero venis muzikbando. La amuzadon brile gvidis Jana Křížková, kiu unue instigis nin, ke niaj „cerbaj dratoj“ vekiĝu kaj ni devis respondi dupaĝan demandilon. La plej bonaj ricevis premion. Ne mankis riĉa tombolo.

*Fotoj de V.Štěpánová, V.Stibůrek kaj J.Hron,*
*kompilis M.Kosnarová kaj J.Rýznarová*



# La unua Internacia Esperanto-Lernejo en Bartošovice

En la tagoj 8-11.11.2012 renovigita radio „Verda Stacio“ okazigis Esperanto-kurson en la vilaĝo Bartošovice, la regiono Moravia Silezio, en la centro de natura rezervejo „Poodří“.



En la vilaĝo staras bela kastelo el la XV-a jarcento. En ĝi ni kun granda intereso admiris barokajn volbaĵojn, lignajn kasedajn pordojn kaj plankojn, fortikan, lignan ŝtuparon kun bela balustrado kaj grandajn kastelajn ĉambrojn por kiu ajn okazaĵo. La kastelo estis multfoje rekonstruata antaŭ ol ĝi ricevis la nunan aspekton. De la jaro 1999 ĝi fariĝis kultura memorindaĵo.

La kastelon ĉirkaŭas ĝardeno kun memoriga, 38 metrojn alta arbo, „platano acerfolia hispana“. Ĝin plantigis en 1833 Josefo Meinert por memoro al sia amata vivpartnerino Josefina. La arbon oni ankaŭ nomas „Josefina arbo“. Ĝi estas registrita kiel la plej maljuna kaj la plej fortika platano en Ĉeĥio. La ĝardeno kreas parton de la kastela instrua pado.

La renkontiĝon organizis Pavol Kaščák, redaktoro de la renaskita radiostacio „Verda Stacio“ kaj lia „dekstra mano“, kunlaboranto Rostislav Čubok.

Dum la inaŭgura vespero ili kore bonvenigis nin. Grupo da infanoj, vestitaj en verdaj vestaĵoj, kantis kantojn en Esperanto. La vilaĝestrino konatigis nin kun la historio de la kastelo kaj vilaĝo kaj la direktorino de la lernejo deziris al ni sukcesojn dum studado.

Ni komune tostis per bongusta trinkaĵo „bowle“ kaj manĝis freŝbakitajn moraviajn kukojn.




15 komencantoj kaj 11 progresintoj el tri landoj, uzis eblon interkonatiĝi kaj ripeti Esperanton laŭ la metodo de slovaka instruisto Stano Marček. Li faris ĉion tre precize kaj bonhumore en moderne ekipita klaso. En la fino de studado ni ĉiam kantis belajn kantojn, gitarakompanis Stano.

Sukcese li prelegis ankaŭ pri kuracaj kreskaĵoj, ni kaptis ĝis nun nekonatajn informojn!

Li rakontis same amuze pri muzikgrupo Team, kies manaĝero li estis.

La vicsekretariino de ILEI Magdaléna Feifičová prelegis pri BEK – baza esperanto kurso. Ŝi montris al ni, kiel rapide ellerni kaj memori tabelvortojn, ekzemple: kiu, tie, ĉial, iom, neniam kaj pluajn. Ŝi ricevis grandan aplaŭdon kaj ĉiutage denove ripetis al ni la memormanieron.



Paŭlo informis nin, kiel serĉi „Verdan Stacion“ en la komputilo, kiel orientiĝi kaj kiel aŭskulti Radion Kubo, Vatikano kaj pluajn, kiuj elsendas en Esperanto.

En reprezenta salono kantis por ni kaj por la civitanoj el Bartošovice, hungara kantistino Anjo Amika.

Ni aŭdis iom konatajn melodiojn aŭ tipe hungarajn kantojn. Vera travivaĵo!!



Promeno en la naturo laŭ instrua pado tre plaĉis al ĉiuj. La gvidanto informis nin pri diversaj kreskaĵoj kaj bestoj, kiuj vivas tie. En bela suna tago ni bone vidis korpterapian lokon Klimkovice, monto-pinton Lysá hora kaj Radhošť en la montaro Beskydy.



Laŭ la plano ni komune plantis Esperanto-tilion. Ĝi poste ricevos tabuleton kun skribaĵo, por ke ĉiuj sciu, ke tio okazis memore al 1-a Internacia Esperanta Lernejo en la jaro 2012. La loko oni nomos „Esperanto parko“.

En la bela kastela medio kaj ĉe la interesaj programoj la tempo rapide pasis.

Vere grandegajn dankojn meritas ambaŭ organizantoj, kiuj senerare kaj volonte zorgis pri ni kaj ĉiam estis inter ni. Plue dankegon al niaj instruistoj, kiuj pacience klarigis la instrutemon, al kuiristinoj, kiuj ĉiam preparis bongustajn „kastelajn“ manĝaĵojn kaj al pluaj volontaj helpantoj. Same dankon al loka televido, kiu preparis la filman dokumenton el nia agado.

Bedaŭru tiu, kiu ne aliĝis al tiu ĉi interesa, kora kaj gaja renkontiĝo!

Ĝis la revido dum pluaj aranĝoj!

*Jana Křížková*

# Iom da humuro

- Mi loĝas en la sesa etaĝo. Hieraŭ mi elkliniĝis el la fenestro, subite mia kapo komencis turniĝi, kaj mi elfalis el la fenestro.
- Ne mensogu, tiukaze vi jam estus morta.
- Kial? Mi falis en la ĉambron.

***

Festante la kvinan datrevenon de la geedzeco, la edzino diras al sia edzo:
- Mi devas ion konfesi al vi, mia kara, mi estas kolorblinda.
- Ankaŭ mi devas al vi ion konfesi. Mi estas nigrulo.

***

Soldato Jano skribas al sia knabino:
- Se mi povos, mi vizitos vin dimanĉe.
Marinjo rapide respondas:
- Venu, vi povos.

***

- Panjo, kial onklino Sara tiom sin ŝminkas?
- Por ke ŝi estu bela, naivuleto.
- Hm, kaj kial ŝi do ne estas?

***

- Panjo, kio estas anĝeleto?
- Anĝeleto estas infano kiel vi, sed fluganta.
- Kaj kial paĉjo diras al la fraŭlino edukistino „mia anĝeleto"? Ĉu ŝi flugas?
- Ankoraŭ ne, sed ŝi flugos plej baldaŭ.

***

Foje oni demandis maljunan ŝaf-paŝtiston, kiom aĝa li estas.
- Mi ne scias.
- Nekredeble. Ĉu vi ne kalkulas viajn jarojn:
- Kial mi kalkulu ilin? Ŝafojn mi kalkulas, ĉar oni povas ŝteli ilin de mi. Sed jarojn de mi neniu forŝtelos.

***

- Juna viro, kial vi venis malfrue en la laboron?
- Pardonu, sinjoro ĉefo, mi hodiaŭ fariĝis patro.
- Ho, mi gratulas. Ĉu knabo aŭ knabino?
- Tion mi ekscios post naŭ monatoj.

***

- Ni ĉiam klopodas pri honoro, sed vi judoj nur pri mono!
- Jes, ĉiu ĉasas tion, kio al li mankas.

***

Antaŭ vilaĝa domo ludas knabineto per pilko. Alparolas ŝin sinjoro:

- Knabineto, kie estas via paĉjo? Mi devas paroli kun li, ĉu vi komprenas?

- Jes, sinjoro, iru jen en la porkejon. Paĉjo tie manĝigas porkojn. Vi tuj ekkonos lin. Li havas ĉapelon.

***

- Sara, ŝajnas al mi, ke la kvara filo estas tute alia ol la tri antaŭaj. Konfesu, Sara, li ne estas mia!

- Ne estu stulta, ĝuste tiu estas via!

***

**KOMENIUS - ZAMENHOF**

# La Vojo al Harmonio

*Jaroslav Karhan (daŭrigo)*

Se eblos ekflamigi tian lumon de ĝenerala saĝeco, ĝi povos disvastiĝadi sur la tuta mondo de la homa racio kaj – kiel sunradioj – vekadi en homoj ĝojon, transformadi volon kaj la tutan mondon de homaj koroj…

Kiam la suno brilas super Tero, ĉiu homo troviĝas en ĝia lumo. Analoge, se leviĝos super la homa koro kaj ĉiuj homaj pensoj kaj agoj la suno de saĝeco, malvualiganta kaj klariganta sencon de ĉiuj aferoj, kiuj ekzistas kaj okazas, tiu ĉi koro ne povos ne kompreni – estante kie ajn – kio okazas, por kio, per kio kaj kiel. Ĉar la plej alta Lumo de animoj estas Dio, Lia brilo povos etendiĝi sur ĉio tiel, ke **ĉiuj** animoj – turniĝantaj kiel ajn – bone perceptu tiun ĉi brilon, se ili mem ne deturniĝos de ĝi…

Por disvastigado de la universala lumo necesas 4 vojoj:

- Universalaj libroj,
- Universalaj lernejoj,
- Universala kolegio de kleraj homoj,
- Universala lingvo.

1. La universalaj libroj devas havi tri avantaĝojn: kompletecon, ordon, veron kaj esti fake diferencigitaj:

1.1 pansofio: kerno de eterna vero, enhavanta konstantajn regulojn, saĝecon kaj disvolvanta nur aferojn klare pruveblajn. La celo estas edukadi homojn saĝajn, strebi al harmonio, ordo kaj vero.

1.2 panhistorio: klarigas ĉiun diversecon de unuopaj aferoj – de ekesto ĝis hodiaŭo. Ĝi estas klara teatro de evoluado de ĉiuj aferoj, eĉ tiuj, kiuj idee estis jam priskribitaj en la pansofio.

1.3 pandogmaro: analizas diversajn justajn kaj eĉ erarajn opiniojn pri aferoj. Neniu libro estas tiel malbona, ke ĝi ne enhavus ion bonan. Gravas por serĉado de vero.

2. Universalaj lernejoj devus esti fonditaj en ĉiuj nacioj. La tuta espero por plibonigo de la mondo dependas je edukado de junularo, ankoraŭ ne difektita, alirebla por formado kaj transformado…

3. La universala kolegio necesas por alkonduki bonajn intencojn al dezirata efiko. Por tiu ĉi laboro taŭgos homoj talentaj, inteligentaj kaj modestaj, arde amantaj la ĝeneralan bonfarton, elektitaj sendiference el la tuta mondo, el la stato laika kaj eĉ eklezia.

Ili pripensados ĉiujn eblajn vojojn kaj rimedojn kiel serĉi ĉion bezonan por ĉiuj kaj kiel la trovitan disvastigadi… Necesas, ke tiuj ĉi heroldoj grupiĝu en specialan unuiĝon kaj kunigu sin per ligo de nerompeblaj leĝoj.

Ilia devizo fariĝu: NI REVENU!

Nome:

- de diverseco al unueco,
- de konfuzo al ordo,
- de hipotezoj al vero,
- de periferio de aferoj al ilia centro,
- de ni mem al Dio!

4. La universala lingvo necesas por disvastigado de universala lumo, ĉar estas pli facile, ke ĉiuj ellernu nur unu lingvon ol unuopulo ĉiujn. Ĝi devas esti lingvo nova, por doni al ĉiuj senton de egalrajteco, kaj kompare kun aliaj lingvoj ĝi devas esti:

● pli facila, por ke ni povu ellerni ĝin sen perdo tempa kaj materia,
● pli agrabla, por ke estu plezuro lerni kaj ellerni ĝin,
● pli perfekta, por ke ĝia kono utilu al preciza komprenado de ĉiuj aferoj.

Se tiu ĉi lingvo estus akceptita de la tuta homaro, ĉiuj ĝoje ekkonus, ke ĝi estas la plej taŭga ilo por reciproka amikiĝado de homoj kaj esprimado de vero pri ĉiuj aferoj. Nova lingvo, havanta tiujn ĉi ecojn, fariĝus la plej bela rimedo, por ke la saĝeco de Dio estu – antaŭ okuloj de la mondo – klarigata novmaniere…

Nur per tiu ĉi vojo eblos renovigi la disŝiritan unuecon de nacioj, doni al la tuta mondo unu buŝon kaj multobligi la Dian gloron per tiel brila rimedo. Tio estos kulmino de ĉio… Tiam ekestos ĝenerala paco sur la tuta Tero, ĉar homoj ne havos kaŭzon por kverelado, se ĉiuj vidos antaŭ si – pri ĉiuj aferoj – la samajn verojn…

Neniun embarasos neunueco de opinioj, ĉar ĉiuj personoj estos lernigitaj ne de homoj – kies opinioj memkompreneble povas diferenci – sed de Dio, kiu estas la Vero… Homoj revenos al la sana racio, forlasos la vivon bestan, komencos vivi kaj kulturi vivon racian, spiritan kaj Dian. Dio kreos sian lernejon en koroj de ĉiuj homoj. Tiamaniere estos feliĉe finitaj ĉiuj ĝisnunaj konfuzoj…

Ekde 1642 ĝis 1648 loĝis Komenius en la pola urbo Elblag, kie li i.a. prilaboradis sian ampleksan verkon «La ĝenerala konsilio por reformo de aferoj homaj.» En 1648 li revenis al la pola urbo Leszno por sia dua restado tie, en 1650 li translokiĝis al la hungara loko Sárospatak. De tie li en 1654 denove revenis al Leszno por sia tria loĝado en tiu urbo.

En 1654 li eldonis sian verkon «Lernejo per ludo». En formo de mallongaj dramoj li prezentas ĉiujn fakojn de homa ekkonado. Tiuj ĉi ludoj atingis mondsukceson.

En aprilo 1656 la pola soldataro tute forbruligis la urbon Leszno, inkluzive la dometon de Komenius. Nur parton de siaj verkoj li lastmomente savis en rapide farita fosaĵo. En sia 64-a jaro li denove fariĝis senhejmulo…

La lastan rifuĝejon li trovis en la nederlanda ĉefurbo Amsterdamo, kien li ekiris en aŭgusto 1656. La reprezentantoj de la urba konsilantaro garantiis al li subtenon, petante, ke li tie instruu…

En 1658 li eldonis en Nurenbergo sian verkon «Mondo en bildoj» («Orbis picktus»), en kiu li prezentas – per bildoj kaj teksto – diversajn fakojn, por pli facila perceptado de legantoj.

En 1662 aperas la 1-a kaj 2-a partoj de la verko «Ĝenerala Konsulto pri la Rebonigo de la Homaj Aferoj». Ĝi estas impresa provo alkonduki **ĉiujn** homojn al toleremo kaj unuiĝo:

Enkonduke li instigas **ĉiujn** homojn komune rigardi la mondon, ruliĝantan en katastrofon, vokante:

«Ni konsterniĝu pri tio komune kaj konsiliĝu, kiamaniere helpi… Kiel estas komuna Dio kaj kiel estas komuna partopreno en suferoj kaj turmentoj, tiel komuna fariĝu strebado forigi ilin…

*(daŭrigota)*

# 2-a Monda Pupekspozicio

okazinta en la urbo Higashikagawa inter la 29a de septembro kaj la 8a de oktobro sukcesis venigi 15.000 vizitantojn. Inter ili troviĝis la guberniestro, la prezidanto de la Gubernia Turisma Asocio kaj nia urbestro. La ambasadoroj de Argentino, Kroatio kaj Uzbekio sendis gratulleterojn elstarigante la gravecon de la kulturaj interŝanĝoj per tiaspecaj eventoj.




Ĉi-jare estis reprezentataj 41 landoj per 700 pupoj faritaj el metalo, papero, maizaj folioj, ligno, porcelano, ŝtofo kaj plasto. La tuta kolekto estis farita danke al la kunlaboro de Esperantistoj. Elstare menciendas, ke la uzbeka registaro sendis dek aŭtentikajn marionetojn, speciale faritaj por ĉi evento.

Tre aprezataj estis la vestaĵoj de la laosaj pupoj, la marioneto el Mianmaro, la mongolaj ĉevalistoj kaj indiĝenoj el Kanado. Ankaŭ japanaj pupoj estis montritaj en 20 hejmoj ĉirkaŭ la ĉefa ekspoziciejo.

En la inaŭgura tago, la prelego de Atilio Orellana Rojas sukcesis plenigi la salonon. Tiam la vizitantoj estis bonvenigataj per mateo, tradicia trinkaĵo el Argentino, nun tute laŭmoda en Japanio. Li prezentis pupojn el Argentino, Bolivio, Nepalo kaj Suda Koreio.

Plia ero en la programo estis parado kun 200 diverslandaj kostumoj, pupa kabuko, pupteatraĵo, ateliero pri farado de pupoj el japana papero. La lokaj manĝejoj servis pladojn el Eŭropo, Usono kaj Azio, ekzemple hinda kareo, seriola* hamburgero, filipinaj frititaj bananoj, udono*, ktp.




La amaskomunikiloj subtenis la aranĝon per aperigo de sep artikoloj en kvin lokaj kaj regionaj ĵurnaloj; plie unu radia kaj kvin televidaj stacioj informis sesfoje pri la evento. Rimarkinde estas, ke la konata TV-kanalo NHK faris dufoje rektajn elsendojn, kiuj tiel efikis, ke la publiko kelkmilobliĝis.

Ni nun kovas la planon por la venontjara ekspozicio kun pli bunta reprezentantaro, diversspecaj teatraĵoj, opero, ktp.

Bonvenon al la 3-a Monda Pupekspozicio en 2013 en Higashikagawa!

*Etsuo Miyoshi*
*Prezidanto*
*Nova Turisma Asocio de Higashikagawa*

*seriolo - fiŝa specio, udono - japana makaronio

# Jindřich Ondráček

(1935-2012)

Honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, eksa asocia kasisto, komitatano de la Praga klubo kaj iama membro de la teatra grupo *Verda ĉaro de Julio Baghy* forpasis la 4-an de marto 2012.



Jindřich Ondráček naskiĝis la 19-an de aprilo 1935 en Nepomuk, la bazan lernejon li vizitis en Starý Plzenec, la fakan lernejon en Plzeň. Ekde la jaro 1955 li loĝis en Prago kaj laboris kiel teknikisto en Esplorinstituto por Maŝinkonstruado (1955 – 1964) kaj en Energetika Esplorinstituo (1964 – 1998).

Pri Esperanto li eksciis el la skolta gazeto *Vpřed* (Antaŭen), en kiu en la jaro 1948 komencis aperadi la Esperanto-kurso de Jan Filip, sed efektive lerni la lingvon li komencis en la kurso de Rudolf Burda ankoraŭ en Plzeň en la jaro 1953 kaj fariĝis membro de la klubo en Plzeň. Kiam li venis en Pragon, li tuj fariĝis membro de Praga Esperantista Klubo, en kiu li tre diligente laboris ĉiumerkrede kaj en junularaj renkontiĝoj ĉiumarde. Li estis ano de preskaŭ ĉiuj komitatoj de la klubo, li partoprenis en eldonado de la kluba Bulteno, prelegis en kunvenoj de la klubo, estis membro de la kluba teatra grupo *Verda ĉaro de Julio Baghy*. En la teatraĵo Pigmaliono de G. B. Shaw li havis la rolon de kolonelo Pickering; tiun teatraĵon la trupo prezentis en 1959 en la 44-a UK en Varsovio.

Inter la jaroj 1965 - 1966 kaj 1979 - 1984 li estis prezidanto de la klubo, longe li estis kasisto de la klubo, inter la jaroj 1999 - 2005 li estis kasisto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, de 1978 li estis dumviva membro de ĈEA. Honora membro de ĈEA li fariĝis en la jaro 2005 en la kongreso en Vyškov. Li estis ankaŭ individua membro de UEA.

Intervjuon kun Jindřich Ondráček ni prezentis en Starto 4/2009, p. 115-116. Tie li rememoras Pigmalionon en Varsovio.

En la Bulteno EK Praha li publikigis artikolojn pri konservado de sano, nome pri manĝoj kaj higieno. Lia konsilo pri la buŝa higieno:

„Same grava estas flegado de la dentoj. Pli frue la homoj ne zorgis pri la dentoj. Ili ne devis kaj havis bonajn sanajn dentojn. Pro tio, ke ili maĉis solidan malmolan manĝaĵon. La dentodifektoj estas malsano de la civilizacio. Kion rekomendi? Zorgoplene mordu sekan panon kun bela dika pankrusto. Kaj krome ĉiutage manĝu freŝan karoton aŭ brasikrapon. La filamentoj de tiu ĉi legomo purigas la dentojn same bone aŭ pli bone ol la dentobroso."

**Rimarko de la redaktoro:** *Mi petas pardonon, ke ĉi tiu artikolo ne aperis jam printempe pro mia nerimarkita eraro en komputilo.*

## Jiří Vychodil
(1940-2012)

Honora membro de ĈEA (1999) kaj ankaŭ de UEA (2004) Jiří Vychodil



forpasis la 9-an de septembro 2012 en Prago.

Li naskiĝis la 4-an de marto 1940 nevidanta. Tial li vizitadis lernejon por blinduloj en Prago kaj poste konservatorion. De 1960 ĝis 1980 li laboris kiel instruisto pri pianludo kaj poste ĝis emeritiĝo kiel informisto en asekura kompanio.

Esperanton li lernis en 1954. En 1976 li kunfondis sekcion de blinduloj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj prezidis ĝin ĝis 1999. Li instruis Esperanton kaj kunlaboris pri lerniloj por blinduloj. Pli ol 30 jarojn li redaktis porblindulan gazeton Aŭroro, longe helpis kiel administranto la organon Esperanta Ligilo de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj kaj brajligis materialojn de kongresoj. En 1999 li gvidis la Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj kaj estis LKK-ano de la 81-a UK en Prago.

## Alena Temelová

La 22-an de decembro 2012 mortis 88-jara s-anino Alena Temelová el Benešov. Ŝi estis multjara membrino de ĈEA kaj de la loka E-grupo. Malgraŭ sia malbona sanstato ŝi ĉiam interesiĝadis pri E-movado.

## Františka Šťávová



(1914-2012)

La 19-an de oktobro 2012 en sia 98-a jaro forpasis Františka Šťávová el Velké Losiny, eble nia plej aĝa membro.

## Donald Broadribb
(1933-2012)

La 13-an de oktobro forpasis usona esperantisto, tradukinto de klasikaj verkoj *Alico en Mirlando* (C. Lewis), *La mirinda sorĉisto de Oz* (L. F. Baum), *La respubliko* (Platono), *Mil naŭcent okdek kvar* (G. Orwell), *Eposoj el Antikva Ugarito*.

## Laŭlum
(1923-2012)

Eminenta ĉina esperantisto, akademiano kaj honora membro de UEA, Li Shijun, konata sub pseŭdonomo Laŭlum, forpasis la 10-an de novembro 2012. Li esperantigis verkojn el la ĉina literaturo, el kiuj pleje gravas klasikaĵoj *Aŝma, Mirrakontoj de Liaozhai, Ĉe Akvorando, Romano pri la tri regnoj, Noktomezo, Pilgrimo al la Okcidento*.

## Richard Hirsch

Kiel oni nur lastatempe eksciis, jam la 17-an de majo 2012 forpasis la germana esperantisto Richard Hirsch, Honora Membro de UEA ekde 1993, fama filatelisto.

# KALENDARO 2012

**2012-12-08** Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek, Info:pisek@esperanto.cz
**2012-12-09** Marcipana Kristnaska dimanĉo
Info: dvor.libuse@seznam.cz

*Migra ekspozicio "Ĉu Esperanto estas morta lingvo?"*

**oktobro** Kastela grenejo en Žirovnice,
**novembro** Urba biblioteko en Dačice
**decembro** Filozofia fakultato MU Brno

## 2013

2013-08-03/10 63-a KELI-kongreso en Svitavy

**ČESKO-ESPERANTSKÁ FRAZEOLOGIE od Josefa CINKA je připravována k vydání v 1. čtvrtletí 2013 v Brně. Toto výjimečné dílo asi s 12 tisíci frazeologických a slovních jednotek na více než 300 stranách si můžete objednat do 31.12.2012 (kvůli stanovení výše nákladu) za subskripční (zvýhodněnou) cenu cca 160 Kč u esperantského sdružení v Brně na adrese: B. Trzosová, Kobližná 13, 602 00 Brno.**

# Konkurso por vizitantoj de ekspozicio

Por fari Esperanto-ekspozicion pli interesa, en biblioteko de Dačice oni elpensis 20 demandojn por la vizitantoj, kiuj povas trovi la respondojn en la ekspozicio mem: *Kio estas Esperanto? Kiu estis L. L. Zamenhof? Kiuj infanlibroj estis tradukitaj al Esperanto? Kion simbolas la stelo?* Ktp. La 20-an de novembro 2012 oni balotis la venkinton.

# Fabeloj

Amantoj de fabeloj povas viziti la retejon http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/fabeloj/ kaj elŝuti al sia komputilo kolore ilustritajn fabelojn en formato PDF.

## Vojaĝo en Esperanto-lando

de Boris Kolker havas novan retejon
http://novajhoj.weebly.com/index.html

### Esperanto-Ponto en Bydgoszcz
### Most Esperanto w Bydgoszczy

Okaze de 125 Jaroj de Esperanto la 3-an de oktobro 2012 Konsilio de Urbo Bydgoszcz decidis honorigi la la gravan datrevenon per bapto de ponto-konstruaĵo trans rivero Brda en Bydgoszcz "Most ESPERANTO". La 27-an de oktobro 2012 okazis oficiala malkovro de du tabuloj kun surskribo "Most ESPERANTO" je ambaŭ flankoj ĉe la Rivero Brda en Bydgoszcz.

### 90-a Germana Esperanto-Kongreso

Nürnberg 17.-20.05.2013
Informoj kaj reta aliĝilo:
http://www.esperanto.de/gek

### 65-a IFEF-kongreso kaj de UFE

de la 4-a ĝis la 11-a de majo 2013 okazos en la franca urbo Artigués-près-Bordeaux kun la temo: *Rolo de fervojoj en la disvolviĝo de la moderna mondo*.
Aliĝilojn akceptas: jeanripoche@wanadoo.fr.

### Itala Esperanto-Kongreso

En Castellaro (Kastelaro) apud San Remo (Sanremo) de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2013 okazos la 80-a Itala Esperanto-Kongreso. kongreso@esperanto.it

# Jak platit svazu

**Pozor, změna účtu!**
**Nyní Fio banka Svitavy**

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:
(ukončení variabilního symbolu)

**06940** členství ČES
**06941** členství UEA
**06942** předplatné Starta bez členství
**06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
**06944** poplatek UK
**06945** kongres EEU
**50400** komise pedagogická ILEI
**50401** písemný kurs začátečníci
**50402** písemný kurs pokročilí
**50404** Paroliga kurso
**50405** svazové zkoušky
**50800** sekce nevidomých LIBE
**50900** sekce zdravotníků UMEA
**51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
**51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
**51200** sekce informatiky
**70100** komise pro tisk a inf.
**80200** ediční fond
**80300** propagace v tisku
**80400** fond Tilio

# Zájemci o časopisy

**Pozor na změnu telefonního čísla!**

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. **311 241 406**, polnicky @quick.cz. Předplatné uhraďte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

**Monato:** 1020,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 610,-Kč
**La Gazeto:** 550,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5
**La Ondo de Esperanto:** 520,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 310,- Kč.
**Juna Amiko:** 280,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5
**Literatura Foiro:** 1130,- Kč (*750,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5
**Femina:** 750,- Kč (*500,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

## Heroldo de Esperanto vychází, ale s potížemi

V letošním roce vyšla jen dvě čísla, totiž č. 2 (celkově 2184) s označením *ĝis februaro* a číslo 5 (2188) s označením *ĝis majo*. Chybí vysvětlení, kam se poděla ostatní čísla, s jakými potížemi vydavatel zápasí a jak vidí budoucnost časopisu. Dokud se tyto věci nevyjasní, stahujeme HdE ze seznamu předplatného.

# Nova estraro de Ĉeĥa Esperanto-Junularo

**Prezidanto:** Vít Guiglielmo Mišurec (1993)
**Vicprezidantino:** Barbora Závodská (1990)
**Kasisto:** Jan Šebetovský (1987)

**Revizia komisiono:**
Marek Blahuš (1986)
Miroslav Hruška (1989)
Daniel Mrázek (1985)

http://mladez.esperanto.cz

## Georg Knaus

(1931-2012)

Germana muzikisto kaj esperantisto forpasis la 27-an de novembro 2012. Danke al li kunlaboris junaj blovorkestroj de Büchlberg kaj Netolice.

# Nový kroužek v Moravských Budějovicích

(městě, které má mj. svůj oficiální web v esperantu) vede Ing. Viktor Dvořák. Jeho členové se schází od začátku října každý pátek v Městském kulturním středisku zvaném Beseda od 15:30 do 16:50 (schůzky zahrnují i výuku pro mírně pokročilé). Od 17h navazuje kurs pro úplné začátečníky- zájemci se mohou i nyní stále hlásit! Kontaktní mail je dvorakovi.mb@volny.cz. Členové klubu jsou zároveň členy Českého esperantského svazu, proto je tato skupina oficiálně vedena jako místní složka organizace.

# Pracovní materiály z konference ČES

jsou vystaveny na stránce http://www.esperanto.cz/cs/aktuality/pracovni-dokumenty-z-konference-ces.html

**Periodikum Českého esperantského svazu - 43. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**malovec@volny.cz**
**http://members.chello.cz/malovec/**

**Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:**

**p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, vhirsx@email.cz, tel. 517 332 339**

**Uzávěrka příštího čísla**: 1.2.2013

---

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio - - 43-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 10 eŭroj, ekster Eŭropo 13 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,**

**Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, malovec@volny.cz**

**http://members.chello.cz/malovec/**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero**: 1.2.2013

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**

**Esperanto-aranĝoj aŭtunaj**



AEH en Štíří Důl



AEH en Štíří Důl



Trilanda Konferenco en Břeclav



Trilanda Konferenco en Břeclav



KAEST Modra, Slovakio



KAEST Modra, Slovakio